



# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Januaro: 3 2023

## LAŬ EŬROP-UNIA KORTUMO, ENTREPRENISTO DEVAS PAGI LA KOSTON DE OKULVITROJ KAJ LENSOJ AL LABORISTOJ

La dua Ĉambro de la Eŭrop-Unia Kortumo ĵus decidis, ke entreprenoj devas preni sur sin la koston de okulvitroj kaj lensoj de tiuj laboristoj, kiuj realigas sian laboron antaŭ komputil-ekrano. Ĉi tiu jura proceso ekiĝis kiam funkciulo de la Ŝtata Enmigrada Departamento en la rumana urbo Cluj, suferis malboniĝon en sia vid-kapablo, pro la fakto, ke li laboris dum multaj horoj antaŭ komputilo.

Kiam ĉi tiu laboristo devis aĉeti novajn okulvitrojn pro la defalo de sia kapablo vidi, li devis pagi 530 eŭrojn. Li petis repagon al nacia sociala asekuro, tamen oni rifuzis tiun peton, ĉar repago de kosto pro okulvitroj aŭ lensoj ne estas antaŭvidita de tiu sociala servo.

Tion mem konfirmis unuainstanca tribunalo en Rumanio. Laŭ tiu unua juĝo, entreprenoj nur estas devigitaj pagi la kostojn de tiuj specialaj aparatoj necesaj por la plenumo de la laboro, kaze ke ili ne estas havigitaj al la laboristo de la entrepreno mem.

Post apelacio antaŭ supera regiona tribunalo en Cluj (Rumanio), ĉi tiu



decidis prezenti demandon al Eŭrop-Unia Kortumo, ĉar ekzistis leĝaj duboj, ĉu inter tiu speciala ilaro por plenumi la laboron troviĝas ankaŭ okulvitroj aŭ lensoj. Se tiel, ili devus esti repagitaj al laboristo fare de la entreprenisto.

Fine, la Eŭrop-Unia Kortumo juĝis ke ... *la repago fare de la entreprenisto de okulvitroj, konforme al la celo de la Direktivo 90/270, garantias pli grandan nivelon de protektado de la sekureco kaj sano de la laboristoj.* Same, ĉi tiu tribunalo rifuzas la ideon, ke oni povas konsideri pagita tiun koston pro la pago de ĝenerala salajra komplemento pagita al ĉiuj laboristoj laŭ sama mon-kvanto.

# *Vorto de la Semajno*

## **Ĉarto:**

1. Mezepoka dokumento, registranta rajtojn aŭ difinanta profitpartojn.
2. Akto, sur kiu baziĝas la politika sistemo de lando, la principoj de interŝtata organizaĵo.
3. Kontrakto inter la luanto kaj la luiganto de ŝipo aŭ aviadilo, por transporto de varoj aŭ pasaĝeroj

*La Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj estis subskribita la 26-an de junio 1945 de 50 ŝtatoj en la urbo Sanfrancisko (Usono), ĝi ekvalidis la 24-an de oktobro 1945.*



Subskribo de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj  
en Sanfrancisko (Usono) 1945.

## ***ĈARTO DE LA UNUIĜINTAJ NACIOJ***

*NI, LA POPOLOJ DE LA UNUIĜINTAJ NACIOJ, FIRME DECIDITAJ,*

*gardi generaciojn kontraŭ la plago de milito, kiu dufoje dum nia vivotempo alportis nedireblan suferon al la homaro,*

*denove konfirmi nian kredon je la fundamentaj rajtoj de la homo, je digno kaj valoro de la homa persono, je la samrajteco de viro kaj virino kiel de ĉiuj nacioj, ĉu grandaj aŭ malgrandaj,*

*krei kondiĉojn, sub kiuj justeco kaj la respekto al la devoj el traktatoj kaj aliaj fontoj de la popoljuro povas esti certigataj,*

*antaŭenigi la socian progreson kaj pli bonan vivnivelon en pli granda libereco,*

...